

Karl Friedrich Mùchler,  
En kel' profunda sidas mi

*tradukita de Joachim Gießner*

En kel' profunda sidas mi  
ĉe plenbarel' da vino  
kaj antaŭ mi da vino ĝi  
de bona origino.<sup>2</sup>

La vinkelist' laŭ oportun',  
li ĝojas, se mi drinkas,  
Boneghumore fartas mi -  
kaj trinkas, trinkas, trinkas.

Soif' turmentas, ĉi demon',  
ĝin devas mi forpeli.  
Kaj tre efikas la propon'  
per vino tion celi.

La mond' ŝajnigas nun, ke ĝi  
sin rozkoloro ŝminkas:  
Boneghumore fartas mi -  
kaj trinkas, trinkas, trinkas.

Sed la soifo kreskas nur  
post ĉiu freŝa vino,  
la konsekvenco de la natur'  
pro trinkofest' sen fino.

Konsolas min, dum sen konsci'  
al planko mi nun sinkas:  
Neniun suferigis mi,  
sed trinkas, trinkas, trinkas.

*Traduko de la Germana poemo "Im tiefen Keller sitz ich hier" de KARL FRIEDRICH MÜCHLER (\*1763-09-02 - †1857-01-12) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-11-25).*

*Arg-944-1897 (2013-12-03 19:31:25)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas sub "Weblinks" en la wikipedia paĝo [http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim\\_Gieŝner](http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_Gieŝner). La kanto estas interalie aŭdebla en <http://www.youtube.com/watch?v=GvyJZoqzw-8>.*

---

<sup>2</sup>Mi, Manfred Retzlaff, proponas jenan ŝanĝon:  
En kel' profunda sidas mi  
ĉe plenbarel' da vino.  
Ja estas vin' en tiu ĉi  
de bona origino.